preta, sed nur prezenti skizajn nociojn por pristudo, kiujn oni estonte disvolvos,... se tempo daŭros.

Tamen mi informas, ke konstante sintena bazo de la studo estis ĉiupunkte normiga, maniere ke la gramatikaj funkciaj nomrilatoj de "o" (nomo) substantivo kaj "a" (nomo) adjektivo en la komunlingva strukturo de Esperanto estas unu por alia ĉiam paralele respondaj al la sociaj homrilatoj de (homo) vira kaj (homo) ina, trovataj en la naciaj originaj bazoj, kiuj donis la formelementojn por la kreo de nia Lingvo. Do, rilate, la normojn por la propraj nomoj, oni nur retrove sekvis inversdirekte la trakuritan vojon.

## 6. Referencoj

*Gomes, M. (1975):* La karaktero de la geografiaj propraj nomoj. Specife pri la "gento/lando"-sencaj nomoj. — Scienca Revuo, 151-158. *Beograd.*

*Gomes, M. (1976):* La valoro de la geografiaj sufiksoj. - Scienca Revuo, 157-166. *Beograd.*

*Gomes, M. (1982):* Pri laŭeble internacia fonetiko de la nacilingvaj grafismoj por la propraj nomoj en Esperanto-tekstoj. -Scienca Revuo, 11-23. Pizo.

## *As características essenciais dos nomes próprios*

*Êste estudo é o ponto de chegada de outros anteriores desenvolvendo questões diversas a respeito dos Nomes Próprios, principalmente do último que apareceu, que tratou das possibilidades normáticas da sua leitura a partir dos sistemas fonéticos nacionais em que os mesmos têm origem.*

*A primeira Parte dêste agora, dedica-se ao sentido básico dos Nomes Próprios, fazendo-o sob quatro pontos de vista: - Que êsses são postos como títulos que distinguem, portanto a causa mesmo para o uso da maiúscula inicial; - Que êles são "próprios", isto é "seus mesmo" ultrapassando assim os limites da sua nacionalidade de origem; — Que têm função atributiva como epítetos, tal como os nomes adjectivos; - E finalmente, que são como que pronomes, pois que como êstes também indicam com precisão os nomes que distinguem entre os outros, comuns. Daí, que os Nomes Próprios são uma classe especial em Gramática, de características internacionais "próprias".*

*Na Segunda Parte êsses Nomes são analisados segundo a forma dos seus elementos e aí encontra-se que a parte principal - o radical da palavra - é invariável, tem o acento e o seu sentido "próprio", chamando-se por isso o "corpo" do Nome; e que a outra parte, mem sempre aparecendo, é flexionalmente substituível, chamando-se por isso o "vestido próprio" do Nome. Daí resulta que os Nomes Próprios são diversamente classificáveis segundo a sua forma, em "nús" (de forma nua) ou diversamente vestidos, (masculinos, femininos ou neutros - consoante a suaforma substantiva, adjectiva, ou outra é respectivamente "o", "a" ou "e"... final).*

*A Terceira Parte conclue mostrando que até as formas mais discutíveis podem ser normalmente entendidas, chegando-se assim a uma universalidade de entendimento normativo.*

# Grava oficiala agnosko por Esperanto

*Detlev Blanke (Berlin, DDR)* doktoriĝis en 1976 per disertaĵo pri komparo de la vortfarado en la germana lingvo kaj Esperanto. *(D. Blanke, 1982: Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung. - Lingvistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte, Nr. 85, Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft. Berlin.* 161 p. Havebla ĉe UEA).

Freŝdate, li akiris la titolon *"doctor scientiae philosophiae" (Dr. sc. phil.)* per defendo de dua doktoriga disertaĵo (la 13-an de februaro 1985): **Bazaj demandoj de la evoluo de planlingvoj — sub aparta konsidero de Esperanto.**

La senato de la scienca konsilantaro de *Humboldt*-Universitato en Berlino akceptis la laboraĵon kiel "disertaĵon B", t.e. en kelkaj landoj "habilitacia disertaĵo" aŭ disertaĵo por fariĝi "doktoro de sciencoj" (Sovetio) aŭ "kandidato de sciencoj" (Ĉeĥoslovakio, Hungario). Per tiu en GDR plej alta scienca grado al la sukcesinto estas principe aperta ĉiu scienca universitata aŭ akademia kariero — se ekzistas ŝtata intereso pri la fako.

La ekspertizojn verkis la universitataj profesoroj *Georg Friedrich Meier* el *Humboldt*-Universitato (komunikad-scienco, ĝenerala lingvistiko), *Johannes Klare* el la sama universitato (romanistiko), kaj *Frank Häusler* el la magdeburga Pedagogia Altlernejo (slavistiko). Verŝajne la unuan fojon en la historio de lingvo-scienco oni donis tiun gradon por la fako "interlingvistiko". Per tio — almenaŭ nomenklature — oni kreis gravan precedenton. La disertaĵo konsistas el du volumoj: I: la teksto (417 + 2p.), II: notaro (pli ol 500 notoj) kaj 2000-titola bibliografio ordigita laŭ 23 sekcioj (kun materialo i.a. el 280 etnolingvaj kaj planlingvaj revuoj).

La sama teksto aperos sub la titolo *"Plansprachen in Theorie und Praxis"* en *Akademie-Verlag Berlin* (1985, mendo-numero 7535643) kaj internacie estos mendebla per la kutimaj libroeksportaj vojoj, aŭ ĉe UEA kaj GDREA. Prezo: ĉirkaŭ 25 markoj. En GDR mendojn akceptas la kutimaj librovendejoj.

Valoras substreki, ke temas pri libro traktanta ne precipe Esperanton, sed precipe la planlingvistikon. Ĉirkaŭ 75% de la tekstoj traktas la planlingvan fenomenon kun ĝiaj diversaj aspektoj kaj nur 25% aparte Esperanton. 33%

de la bibliografio entenas esperantologiajn titolojn.

La aŭtoro klopodis kritike prilabori kaj utiligi la ĉefan internacie alireblan materialon ĝis fino de 1983. Elirante de la rilatoj inter lingvoplanado kaj planlingvo li traktas la "artefaritan" aŭ la "konscian" en la lingvo-evoluado, tre detale diskutas la diversajn terminojn (pli ol 20) ĉirkaŭ la ĉefa termino "planlingvo" kaj prezentas konsiderojn kaj materialojn pri la nombro kaj ĉefaj motivoj de la ekestiĝo de planlingvoj. Detala ĉapitro prezentas la kontraŭdirajn kriteriojn de lingvistoj, laŭ kiuj oni konstruu planlingvojn. Diversajn klasifikoj estas kritike prezentataj kaj kompletigataj per la klasifiko "laŭ komunikada funkcio" (planlingvaj **projektoj, semi**planlingvoj, plan**lingvo** (= Esperanto).

Sekvas trakto de ĉefaj pazigrafioj, aprioraj kaj aposterioraj planlingvaj projektoj (resp. semiplanlingvoj) kaj Volapuko.

Aparte detale estas traktitaj la sistemoj de la naturalisma skolo kaj tre detale laŭ originalaj dokumentoj — la historio de *International Auxiliary Language Association (IALA).*

100 paĝoj traktas pri Esperanto, la lingvopolitika rolo de *Zamenhof*, la strukturo kaj lingvaj ecoj de Esperanto (grafemoj, fonemoj, morfemaro, vortfarado, vorto kaj signifo, strukturo de la leksiko, sintakso, lingvotavoloj kaj stiloj, evoluo-stabileco-normo), lingva komunumo de Esperanto kaj apliko de Esperanto en la praktiko. Tre mallonga ĉapitro pri la rilatoj inter la planlingvoj kaj interlingvistiko finas la libron.

La traktado de la ĉefaj planlingvaj sistemoj akcentas pli forte — ol ĝis nun farite — la komunikadan funkcion kaj aliajn soci-lingvistikajn aspektojn de la planlingvaj movadetoj.

Sendube la ĉapitro pri Esperanto meritus esti pli ampleksa. Sed drasta spaclimigo tion ne permesis. Eventuale la libro efikos stimule tiel, ke la eldonejo pretos publikigi apartan monografion pri Esperanto. Jam ekzistas flanke de la eldonejo konsideroj por traduko alinacilingven.

La libro enhavas aparte riĉan bibliografion pro du kaŭzoj:

1. La temo en nacilingvaj medioj renkontas ofte skeptikecon. Detala utiligo kaj prezento de faka literaturo montras maturecon de la temo.

2. Se jam por informitaj interlingvistoj kaj esperantologoj ofte estas nekonataj multaj tre specialaj valoraj studoj, tiom pli nekonataj ili estas por nove interesitaj sciencistoj, laborantaj en nacilingva medio. Ili havos rapidan starton pro la pretigita kaj tralaborita bibliografio.

**Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**

*Direttore responsabile: Aldo de' Giorgi*
*Registrazione n. 2 del 3.2.82 presso il Tribunale di Pisa*
*Stampato nel dicembre 1985* — Presita dum decembro 1985

## Enhavo

**N-ro 1 (149): esperantologia kajero**

Provizora regularo por esperantigo de germanaj onomastikaĵoj
(Rikardo Ŝulco) ..... p. 5

Problemoj de esperantigo de nederland(lingv)aj loknomoj
(*Wouter F. Pilger*) ..... p. 13

La esenca karaktero de la propraj nomoj
Senca kategorio kaj (inter)nacia formo
(*Manuel Gomes*) ..... p. 27

Grava oficiala agnosko por Esperanto
(*Detlev Blanche*) ..... p. 39